



NORMANDA ESPERANTO BULTENO

N° 280

Dépôt à la Bibliothèque Nationale, au fonds normand de la Médiathèque de Caen
et à la bibliothèque de Cherbourg.

Aprilo 2021

Redaktas : Yves Nicolas, 14 place Laënnec, 14 000 Caen. Tel. 06 44 87 22 48
ivnicolas@sfr.fr Enpaĝigas : Michèle Langeois

Abono-kotizo : 10 €. « Espéranto – Normandie ». C. C. P. 283.40 H Rouen

Kasistino : Sylvie Caron, 44 rue Gustave Lennier. 76600 Le Havre



ÉDITORIAL

En guise d'éditorial, nous avons choisi le texte ci-dessous d'Henri Rousseau qui propose régulièrement des articles pour notre bulletin. Il nous raconte un adolescent qui décida d'arborer fièrement une étoile verte découpée dans un morceau de carton. Un carton de rien du tout au revers de sa veste alors que le monde était à feu et à sang ! Une bien belle histoire qui relativise l'épisode pandémique que nous vivons actuellement. Haut les cœurs !

MIA UNUA ESPERANTISTA RENKONTO

Antaŭ kelkaj tagoj, dum telefona konversacio kun samideano Jean Pierre Sauvage, iumomente mi rakontis al li kiel, jam esperantano de pluraj jaroj, mi hazarde, unuafoje, renkontis esperantiston en pariza strato. JPS amike juĝis interesa tiun anekdoton, kaj al mi sugestis ĝin proponi al nia bulteno NEB. Jen ĝi.

Ĉirkaŭ 1943, aĝante 15 jarojn mi ege ŝatis fremdajn lingvojn : en mia kvara klaso de liceo Michelet en Vanves, mi lernis la anglan, la hispanan kaj la latinan, sed kompletigis tiun devigan studadon per aĉeto ĉe la bukenistoj (1) de la kajoj de Sejno en Parizo, de lernolibroj de la plej strangaj lingvoj kiujn mi hazarde vidis ; Tiel, mi hodiaŭ (aprilo 2021), ankoraŭ posedas, interalie, lernolibrojn de la bulgara, la persa, la araba, la rumana, ... Kaj iun tagon, mi vidis ruĝkovrilan libreton, titolitan "Nouveau cours rationnel et complet d'Espéranto", de 1933.

Mi ĝin aĉetis, sciante ke temis pri lingvo, ĉar en mia familio praonklo Henriko, kiun mi nur tre malofte renkontis, havis la reputacion ĝin paroli. Hejmen reveninte, mi komencis legi la prefacon de mia akiraĵo, kaj tuj komprenis ke ne temis pri lingvo kiel la aliaj. Iom traleginte la sekvon, mi entuziasmiĝis pro ĝia facileco kompare kun la lingvoj kiujn mi estis jam supraĵe ekzameninta. Unu monaton poste, mi konis la plejgravaĵon de la lingvo, kaj tedis fraton kaj patrinon ilin alparolante en esperanto por trejniĝi, eĉ se mi devis poste plejofte ripeti en la franca. Mi krome fariĝis ĉirkaŭ mi, sensukcese, konvikita propagandisto, kaj faris el kartono verdan stelon, kiun mi fiere portis ĉe butontruo.

Tiel daŭris eble du aŭ tri jarojn, kaj en 1946 verŝajne, marŝante sur trotuaro de la bulvardo Gambetta en Parizo, plenkreska nekonatulo kiu sur la sama trotuaro iris miarenkonten, subite min alparolis en fremda lingvo kiun mi strange tamen tute komprenis :

• He junulo, mi vidas ke vi portas verdan stelon, ĉu vi estas esperantisto ?

Spontane, rimarkinte lian verdan stelon, mi respondis en esperanto :

• Mi nur estas propagandisto de la lingvo, kaj vi estas la unua persono " ke" mi renkontas kiu parolas ĝin. Mi kredis ke la movado estis tute morta pro la milito.

La konversacio tiel daŭris dum kelkaj minutoj sur nia trotuaro, je la granda miro de la nekonato, kiu fine min proponis :

• Min sekvu, ni estas tute proksimaj je sidejo de esperantista organizaĵo kie vi povos konatiĝi kun aliaj esperantistoj.


➡ P.2

Mi jesis, kaj estis akceptita de kelkaj deĵorantoj de SAT-Amikaro. Mi ne restis pli ol unu horo kun ili, ricevis multajn intereseĝajn informojn pri la movado, foriris, kaj neniam reiris. Mi denove estis izolita esperantisto.

Sed en 1948 venis la tempo de mia Militista Servo, kaj mi ricevis ordonon min prezentiĝi al la kazerno Bessières por esti tuj transsendita al la Unua Regimento de marokaj tirajloroj (1-er RTM) en Port Lyautey, Maroko. Sed mi konis la ekziston de la reto de esperantistaj delegitoj de UEA, kaj skribis al la grava kaj aktivega klubo de mia baldaŭa restadejo, kiu responde skribis ke ili kun plezuro min ricevos, min informos pri la lando, ktp ... Sed estas alia temo ! Mia vera esperantista vivo komenciĝis, kiel ankaŭ mia loĝado en Afriko dum 25 jaroj.

Henri ROUSSEAU

(1) Bukeno : (Neologismo HR) : Malnova, ofte etvalora, aĉastata.



NORMANDA MALNOVTEMPA ANEKDOTO

N'ayez crainte, seules les premières lignes de l'article qui suit seront en normand ; les suivantes ne seront qu'en espéranto. Donc, ne vous découragez pas d'emblée, continuez la lecture.

Cette histoire a été racontée par JB Pasturel à la soirée des Anciens Combattants de Cherbourg le 11 novembre 1924.

« Touène, eun fermi d' tchu nouos, et sa femm' Rosalie, s'raient byin pus héreus si l' pour Touèn' n'avait pas eun grain d' sé dauns l' gousi ; mais sa sacrée pépie fait qu'il en aval' taunt qu' seur, i n' étal'ra pas. Mais à prêchi frauch'ment, qui qu' vo vouolez qu' nou fasse ? À côté du pur jus, nou peut-i mouori d' sei ? »

Antono, apudeja farmisto kaj lia edzino Rosalio, estus multe pli feliĉaj se la kompatinda Antono ne havus kvazaŭ salgrajnon en la gorĝo ; tiel, konstanta malbenita soifego okazigas ke li tiom trinkaĵon glutas, ke certe, li ne plu longe rezistos. Sed, se oni verdirante parolas, kion vi volas ke ni prie faru ? Vivante tute apud pura vinbersuko, ĉu ni rajtas pro soifo morti ? Kiam ulo havas en sia kelo du aŭ tri centojn da brandaj kruĉoj, estus peko mi kredas, nenion meti en sian kafon !

Kaj fakte, en tiu sezono Antono malofte elebrieciĝis, ĉiam for pro fagopirdraŝado. Kaj la kompatinda Rosalio ne ŝatis tion ! Ĉar ĉiutage ŝi mem devis fari sole, la necesajn bovinmelkadon, nutradon de kortobirdoj kaj aliajn farmejajn laborojn.

luvespere, atendante la viron flikante liajn strumpetojn, ŝi al si diris :

• Ci, edzo mia, se ci denove rehejmiĝas ebria hodiaŭ, mi al ci rakontos anekdoton tian, ke se post aŭdado, ci daŭros diboĉadi, signifos ke ne plu ekzistas rimedo por cin kuraci.



Kaj ve, Antono rehejmiĝis ebria kiel liakutime. Li diris ke oni estis lin drinkiginta pli ol kion li estus volinta fari, solece grumbladis, aranĝis sian plumliron, kuŝiĝis, kaj sin turnis al la muro. Por

Rosalio estis la taŭga momento por aŭdigi sian anekdoton :

• O povra Antono, Dio mia, jen granda malfeliĉo : Petro, cia plej bona amiko, la edz' de Viktorino, li mortis hieraŭ vespere kiam ili ambaŭ kuŝiĝis.

• Antono rerektiĝis : Ci verŝajne revas, ĉar mi trinkis kun li en la domo de Nestor, hieraŭ postagmeze !

• Tamen tiel estas ! Kaj kia terura morto ! Hieraŭ vespere, sin kuŝante plenplena je brando kiel ci, blovestingante la kandelon, la fajro saltis al lia faŭko kaj iom post iom nekontraŭstareble ekpropagiĝis al lia tuta korpo !

Antono silente sin returnis al la muro ; Rosalio, kontenta, ridetis pensante : Ci, "men vuus" (mia maljuno), se ci ankoraŭ drinkas post tio, kion mi devos inventi por ke ci ĉesu tiom drinki ? Sed eble ci estos kuracita ? Kaj fakte, Antono subite residiĝis, palega, kun haroj hirtigitaj sur la kranio, ĉiuj membroj tremantaj ; li petis Rosalion :

• Al mi transdonu la krucifikson, ĉar mi, mi alte taksas la vivon !

• Funkcias ! pensis Rosalion, tiufoje finfine li timis !

• Mi ĵuras al ci, Dio atestante, ke neniam plu mi blovestingos mi mem la kandelon kiam mi estos ebria !

Henri Rousseau (14)



AFERO JULES DURAND, en Le Havre.

Kiel kutime, Hérrouville-Espéranto partoprenis finfebruare la virtualan « Poliglota Kafejon » de Hérrouville kaj elektis kiel temon « Jen memorindaj datoj ». Dekkvar homoj el Normandio kaj Italio proponis tre diversajn datojn en rilato aŭ sen rilato kun Esperanto. Bertrand elektis daton pri dramo kiu tuŝis nian regionon.

La 20an de februaro 1926 mortis **Julio Durand**. Kvankam placo en Parizo kaj statuo inaŭgurita en 2018 en Havro memorigas al ni lian nomon, la plej multaj homoj, eĉ en Normandio, tute forgesis aŭ ignoras lin.



Julio Durand naskiĝis la sesan de septembro 1880 en Havro. Kiel ia patro, li laboris kiel dokisto . Li partoprenis plurajn batalojn : kontraŭ alkoholismo kaj kontraŭ maljusteco.

Li longe aliĝis al la Ligo de Homaj Rajtoj kaj li poste aliĝis al la Konfederacio Ĝenerala de la Laboro (CGT). En 1910, li estis sekretario de la sindikato de la karbistoj de la haveno, kiu postulis, ke la Transatlantika Ĝenerala Kompanio plipagu la laboristojn, kiuj malŝarĝis karbon kaj, ke duŝejoj estu instalitaj sur la kajoj por ili. Marko Hedriŝ, la prezidanto de la asiza kortumo de Orne, kiu verkis libron pri tiu afero* diras: «La vivkondiĉoj de ĉi tiuj havenaj laboristoj estis teruraj. Zola povus verki *Germinal* en Havro ».

Multaj laboristoj strikis, sed la estraro cedis pri neniuj punktoj. La 9-an de septembro 1910, unu el la kolegoj de Julio Durand estis mortigita sur la kajoj. La sekvan tagon, onidiro kreita de la estraro de la transatlantika kompanio, ŝvelis en la urbo : laŭdire Jules Durand ordonis la murdon de Julio Dongé kiu kontraŭstaris la strikon. Fakte li estis mortigita dum disputo inter drinkuloj. Julio Durand estis malliberigita kaj juĝita de la asiza kortumo de Rueno. Lin defendis juna nesperta advokato : **Renato Coty** kiu poste fariĝos Prezidanto de la Respubliko. Li pruvis, ke la atestantoj mensogis kaj, ke nenio pravas la kulpecon de Julio Durand. La sindikatisto tamen estis mortkondamnita la 25-an de novembro.

Manifestacioj estis organizitaj tra la tuta lando, kaj ankaŭ eksterlande. La 31-an de decembro 1910 Prezidanto Fallières decidis parte absolvi lin kaj transformis lian mortkondamnon al sep malliberaj jaroj. Vasta populara mobilizado fine sukcesis lian liberigon la 16-an de februaro 1911. Li tiam estis triumfe bonvenigita de siaj kamaradoj en Havro. Sed, li jam freneziĝis en la malliberejo kaj suferis pro persekuta deliro. La 30-an de marto 1911, li estis internigita en la psikiatria hospitalo de Sotteville-lès-Rouen, en la sekcio por la senhavuloj, estrita de D-ro Lallemand, kiu fakte prezidis la ĵurion, kiu kondamnis Julio Durand al morto kelkajn monatojn antaŭe !

La sindikatisto mortis la 20-an de februaro 1926, nur 45 jaraĝa. Li neniam sciis, ke juĝo de la kasacia kortumo finfine deklaris lin senkulpa, en junio 1918. Li neniam povis revidi sian kunululon. Li eĉ ne konis sian filinon, kiu naskiĝis la 14-an de marto 1911.



Bertrand Verstraete (14)


*Kelkaj libroj :

- « *L'affaire Jules Durand. Quand l'erreur judiciaire devient crime* ». Marc Hédich. Préface de Henri Leclerc.

Michalon, septembre 2020.

- « *L'affaire Durand. 1910-2010, centenaire de la machination contre Jules Durand, anarchiste et syndicaliste du Havre* ». Patrick Rannou. Editions CNT, 2010

- « *Les docks assassinés. L'affaire Jules Durand* ». Bande dessinée de Roger Martin. Les éditions de l'atelier, 2016.





Une visite au Havre en Espéranto ?

« Greeter » à votre service !

« Greeter ». Ce terme vient de l'anglais «to greet» (saluer, accueillir). Le greeter est un habitant qui fait partager sa passion pour sa ville à des personnes par des balades. Il n'est pas un guide conférencier professionnel mais un bénévole faisant découvrir son « territoire », à sa manière, en toute convivialité.

Le mouvement des greeters est né à New York à l'initiative de Lynn Brook, en 1992. Les antennes françaises sont apparues dans les années 2000. Le réseau des greeters havrais existe depuis 2015. Il se compose de 18 Havraises et Havrais qui accompagnent visiteurs, touristes et nouveaux arrivants.

J'ai rejoint ces partenaires de l'Office de Tourisme depuis 2018 et propose de décliner les propositions de balade ou des thématiques à votre gré en Espéranto.

Rendez-vous sur le site www.greeters-lehavre.com

Bonvenon !

Sylvie Caron (76)



Article paru dans Ouest-France le 16 mars 2021

Où l'espéranto se fait voir et entendre.....

L'espéranto se pratique désormais en ligne

Hérouville-Saint-Clair — En une année de Covid-19, les visioconférences en espéranto n'ont jamais été aussi nombreuses. Une autre façon de parcourir le monde pour les pratiquants de cette langue.

Après trente-cinq ans d'existence, le groupe des espérantistes hérouvillais tire le bilan d'une année de restrictions liées au Covid-19. Si les rencontres et les voyages habituels ont été annulés, ils constatent cependant une explosion des rencontres virtuelles avec un nombre croissant de participants, notamment des jeunes qui portent un intérêt à l'espéranto. Cette langue internationale, utilisée par des personnes provenant d'au moins 120 pays, s'empare, elle aussi, des plateformes qui permettent de communiquer en groupe à travers le monde.

Café polyglotte

« Notre groupe était majoritaire au dernier café polyglotte et nous étions treize lors de notre dernière visioconférence mercredi », précise Yves Nicolas, qui en assurait l'animation. A cette réunion participaient un Autrichien, un Brésilien, un Suisse, un Allemand et une Italienne. « Notre dernière rencontre physique, avec les Québécois à la bibliothèque d'Hérouville-Saint-Clair, date de janvier 2020. Elle portait sur le thème des migrations. »

Sur environ soixante-dix pratiquants en Normandie, une vingtaine d'Hérouvillais multiplie désormais les contacts par Internet, le meilleur moyen pour eux de rendre encore plus vivant l'espéranto.

Tous racontent leurs souvenirs : le congrès de Lille, en 2015, avec ses 3 000 personnes, et aussi leurs voyages, seuls ou en groupe. « En juillet 2007, j'ai voyagé par le transsibérien, entre Moscou et le lac Baïkal. Grâce à l'espéranto, j'ai été guidé et hébergé de façon remarquable », raconte Gérard Sénécal.



L'association Espéranto d'Hérouville-Saint-Clair et sa bibliothèque sont installées à la maison des associations.

Même expériences pour Yves, qui a passé trois semaines en Iran. Bertrand Verstraete, lui, prépare un périple à vélo jusqu'à la Mer noire et espère mettre à profit sa pratique de l'espéranto au cours de ce voyage et lors de ses hébergements.

Deux à trois années d'apprentissage (soit, 200 heures) suffisent pour tenir une conversation. L'espéranto, inventé en 1887 par le russe Zamenhof, est une langue facile, avec « une base fondamentale de racines communes et seulement seize règles de grammaire. Ça s'écrit toujours comme ça se prononce, et inversement », ajoute Gérard.

Les cours ont lieu le mardi, à 17 h 30, en visioconférence, puis ils se connectent autour d'un thème à 18 h 30. Chaque mois, une visioconférence internationale est proposée. La dernière concernait les hobbies de certains participants.

Association Espéranto, tél. 06 44 87 22 48 ; mail : herouville-espanto@sf.fr

Gérard Lecarpentier, résident de l'agglomération saint-loise, a eu la bonne idée de nous signaler la parution en espéranto de son livre **«Piaj malprudaĵoj... kaj aliaj rakontoj »** édité en 2000 en version électronique par la maison **« Eldonejo Libera »** (<https://e-libera.weebly.com/bitlibroj.html>).

Nous y avons trouvé tout au long de 234 pages de courtes nouvelles ainsi que des traductions d'auteurs français et des extraits d'œuvres connues du registre européen que l'auteur prend plaisir à parodier. La diversité des thèmes abordés et des styles littéraires nous invite à une lecture à petites gorgées comme on le ferait d'un Calvados hors d'âge qui doit imprégner toute la bouche afin d'être apprécié dans toutes ses nuances. Dans ses nouvelles, Gérard Lecarpentier met fréquemment en scène des animaux suffisamment malins pour berner les humains dont de nombreuses faiblesses nous sont également contées. Une pointe d'humour, une pincée de sarcasme mais aussi de la farce et du poil à gratter, la recette est savoureuse ! Pour sûr que les promenades de Gérard Lecarpentier dans les chemins creux du bocage normand ne sont pas pour rien à l'affaire !

Ajoutons à cela une belle introduction de Julian Modest, écrivain bulgare très en vogue actuellement dans l'édition ainsi que dans les revues espérantistes pour ses nouvelles et autres romans policiers.

Assurément, vous ne regretterez pas votre achat ! Mais tout d'abord, faisons, si vous le voulez bien, connaissance avec l'auteur...

Gérard, tu habites à proximité de Saint-Lô. Peux-tu te présenter ?

Je suis un normand de 70 ans, originaire de la région de Douvres-la-Délivrande. Après des études de Lettres, j'ai enseigné le français d'abord en qualité de coopérant dans un lycée algérien, puis au collège privé de Carentan, où j'ai également enseigné quelque temps (trop peu à mon goût !) le latin.

Quel est ton rapport à l'espéranto ? Depuis quand le pratiques-tu ? A quelle occasion l'as-tu appris et pour quelles motivations ?

Je pratique l'espéranto depuis environ 25 ans. Je n'avais pas (et je n'ai toujours pas, ce qui expliquera peut-être certaines de mes réponses ultérieures) de motivation très profonde, autre que linguistique : j'étais curieux de savoir ce qu'est concrètement cette langue dont j'entendais parler depuis longtemps. Je n'étais pas non plus insensible à l'aspect humaniste (dont j'avais vaguement connaissance) de l'entreprise espérantiste.

Quels liens entretiens-tu avec les structures espérantistes, leurs organes de presse, les sites internet ? Es-tu en contact régulier avec des espérantistes ?

Je n'ai guère de contact avec les « structures espérantistes » ; je n'ai même plus de correspondant étranger depuis plusieurs années.

Pour certaines de tes parodies d'œuvres célèbres, tu t'appuies sur des traductions

d'espérantistes de renom comme Grabowski, Waringhien ou l'actuel Valentin Melnikov. Quel rapport entretiens-tu avec la littérature originale ou de traduction en espéranto ?


J'ai lu quelques « mikronoveloj » (en fait, très peu), notamment de Raymond Schwartz, de SF (recueil intitulé « Sferoj ») et quelques autres nouvelles d'origine diverse.

Comment as-tu eu contact avec la maison d'édition ? A-t-elle eu des exigences éditoriales qui t'auraient amené à apporter des modifications, des corrections, à tes récits ?

J'ai adressé trois ou quatre textes à « Eldonejo Libera » ; à la suite de quoi on m'a proposé d'envoyer mes autres textes. J'en profite pour signaler qu'un correcteur a travaillé sur mes « œuvres » et j'ai pu ensuite vérifier ses corrections, assez nombreuses je dois le reconnaître (désolé !! je ne suis pas un écrivain)

Qu'est-ce qui t'as amené à écrire en espéranto ? Les qualités intrinsèques de la langue ? L'envie d'apporter ta touche à ce que nous pouvons déjà lire en espéranto ? Quelles différences as-tu noté avec l'écriture en français ou dans une autre langue ? Ecris-tu également en français (ou dans une autre langue) ? Egalement des nouvelles et des parodies ? Sont-elles publiées ?

J'écris également en français des nouvelles,



des parodies... que j'adapte fréquemment en espéranto, souvent en les modifiant, en les développant car de nouvelles « idées » apparaissent à la relecture d'une première version. En bref, mes textes français inspirent souvent mes tentatives

« esperantlingvaj ». J'écris bien sûr plus aisément en français ; cependant l'espéranto me donne parfois davantage de liberté : au plan linguistique (création de mots, ordre des mots dans la phrase...) ; en termes de contenu, l'utilisation d'une langue étrangère me permet de « dire des choses » que je n'oserais écrire en français (peut-être par peur du ridicule, ou pour quelque autre raison...qu'il ne me semble pas souhaitable de développer ici !

En quoi les auteurs français que tu choisis de traduire ou de parodier (La Fontaine, François Villon, Du Bellay, Prévert, La Bruyère. Pourrait-on y ajouter les contes normands de Maupassant ?) ont influencé tes nouvelles de la première partie du livre ? J'ai choisi de parodier ou de traduire des textes que j'aime. C'est difficile de déterminer l'influence de leurs auteurs sur ma modeste écriture sauf pour La Bruyère dont j'essaie d'imiter la manière quand je rédige des portraits... Je pense en outre ne pas échapper à l'influence de La Fontaine. (Petite remarque annexe : j'éprouve un peu de gêne à parler de moi en relation avec de si grands écrivains auxquels je n'aurais évidemment pas l'audace de me comparer, quelle que soit l'influence qu'ils peuvent avoir sur mes textes). Quant à l'hypothèse Maupassant, je t'en suis reconnaissant, je reconnais que je n'avais pas du tout pensé à écrire en relation avec notre compatriote normand que pourtant j'apprécie énormément ; si à l'avenir j'écrivais quelque chose qui lui soit lié, je pourrais te le communiquer.

Tu mets en scène des humains, des animaux et des objets personnifiés que tu dépeints avec humour et sarcasme pour décrire, mine de rien, les petits et les grands malheurs de notre quotidien et de nos sociétés. L'actuelle pandémie serait-elle pour toi une nouvelle source

d'inspiration ?

Je n'ai rien écrit en espéranto concernant l'actuelle pandémie (ça viendra peut-être), je n'ai que parodié/pastiché la chanson de Trenet Douce France, au début du confinement de l'an dernier (nous ne mettons que les premiers vers dans cet article, faute de place):

Plus tard on lira l'histoire
De ces journées confinées
Chez les bobos, les loubards.
On fouille tous les greniers,
Non pour trouver des babioles
(Oh non ! Quel chemin de croix !) :
Les masques sont des idoles,
Bien plus que Dieu ou Allah.
Refrain
Frouss' intense,
Obligatoire prudence,
Risque de condoléances,
Attente de jours meilleurs ;

As-tu un petit « kekchose » de derrière les fagots pour le Bulletin Normand ?

Pour rester dans le pastiche, voici une adaptation un peu gaillarde du Dormeur du Val.

La Donĵuano de l'Balo
Subite studentino aŭ kasistino
Gracie, senafekte antaŭneniĝas.
Tiu mirindaĵo, sen akompananto,
Ridas ; baldaŭ sian subjupon ŝi valsigas
Revante liton, li ŝin imagas nuda,
Mordante blankajn mamojn, kisante
bongustegan
Korpon lacan de virto. La naŭvulino bela
Ne multe kontraŭstaros proponon teneran.
« Fraŭlino ! Vi ja akceptos danci kun mi ! »
Ŝi lin esploras malvarme antaŭ ol jesi.
Baldaŭ li alpremas ŝin al si tre pasie.
Li kovras ŝian dorson per firmaĵoj karesoj.
Sed interesiĝante nur pri monaferoj
Tiun kredemulon ŝi kaptos tute certe.

Entretien réalisé par Yves Nicolas, rédacteur de notre bulletin normand.

L'espéranto se montre à la télévision en 2021

L'espéranto s'affiche au côté des extraterrestres. En effet, en ce début d'année, Canal+ diffuse une nouvelle série OVNI(s) où chaque épisode est l'occasion d'entendre quelques mots d'Esperanto. Dès le premier épisode, les présentations se font : « Ravita », « ça veut dire Enchantée en Esperanto ».

Et tout au long de la série, Vera fait la promotion de l'Esperanto. Il est même question d'une langue commune à toute l'humanité. Serait-ce l'Esperanto ? Le ton est donné !

Vous pourrez aussi entendre parler Esperanto dans un film un peu plus ancien Captain Fantastic qui date de 2016, où deux sœurs échangent dans cette langue afin de ne pas être comprises par leur père.

D'une langue pour l'humanité entière à une langue secrète entre adolescents, chacun pourra y trouver son compte !

Pour en savoir plus sur l'Esperanto au cinéma : https://fr.wikipedia.org/wiki/Cinema_espérantophone

En 2021, Esperanto televide montriĝas

Esperanto montriĝas apud eksterteranoj. Efektive, ekde la komenco de 2021, Canal + elsendas novan serion NIFO(j), kie ĉiu epizodo estas okazo por aŭdi kelkajn vortojn en Esperanto. Ekde la unua epizodo, fariĝas la prezentoj : "Enchantée", "tio signifas : Ravita en Esperanto".

Kaj tra la tuta serio, Vera promocias Esperanton. Oni eĉ parolas pri lingvo komuna al la tuta homaro. Ĉu tio povus esti Esperanto? La tono estas donata!

Vi ankaŭ povas aŭdi parolatan Esperanton en iom pli malnova filmo « Captain Fantastic » de 2016, kie du fratinoj interŝanĝas en tiu lingvo por ke ilia patro ne komprenu ilin.


De lingvo por la tuta homaro ĝis sekreta lingvo por adoleskantoj, Esperanto taŭgas !

Por scii pli pri Esperanto ĉe la filmoj : https://fr.wikipedia.org/wiki/Cinema_espérantophone

Patrice DUFEU(76)




LA VIRTUALAJ KUNVENOJ * DE HEROUVILLE-ESPERANTO



La klubo de Hérouville rifuzas muti dum la nuna pandemio kaj virtuale kunvenas ĉiun mardon je 18h30. De 12 ĝis 22 homoj vizitas tiun rendevuon el la klubo mem, el Normandio aŭ Francio sed ankaŭ el Eŭropo. La semajna temo estas anoncita en « Eventa Servo », tre vizitinda retpaĝo kiu listigas multajn virtualajn rendevuojn.

La temoj estas tre diversaj. Jen pluraj ekzemploj : «Ŝlimo kiu kuracas »(Gigi) ; «Mia restado en Aŭstralio » (Claude) ; « Fotaludo pri Caen kaj Hérouville » (Yves), « Blagoj, ŝercoj kaj anekdotoj », « Prezentu ŝatatan foton, bildon, objekton »,



« Jen memorindaj datoj », « Prezentu vian ŝatokupon », « Demanda ludo »(Bertrand). La 23an de marto, Fransoazo Oazo gvidis kurson pri « Oftaj eraroj en Esperanto ». Hérouville Esperanto ankaŭ partoprenas la virtualan « Poliglota Kafejo » organizata de la urbodomo de Hérouville. Tiu rendevuo konsistas el tabloj por la rusa, angla, germana, ktp, kaj esperanto lingvoj. La esperanta tablo kun averaĝe 14 homoj estas unu el la plej aktivaj tabloj (entute inter 35 kaj 45 homoj).

* animas Ivo




« La Bulteneto », dulingva magazino eldonata en Vieno»

Dum Zoom kunveno de Hérouville-Esperanto pri „viaj ŝatokupoj“ vizitis nin **Walter Klag** por reklami pri la interesa revuo kiun li redaktas. En la numero 60a legindas artikolo pri la renovigo de granda kaj bela priarta muzeo « Albertina Modern ». La tre allogaj fotoj donas motivon al la leganto por viziti tiun belan muzeon, ankaŭ Vienon entute... sen forgesi la tre oficialan kaj rimarkindan muzeon pri Esperanto.

Alia artikolo pritraktas la renaskiĝon en 2012 de esperantistaj moneroj kun valoro de 1 ĝis 3 « Steloj » kies ilustraĵoj sinsekve estas pri gufo, papago, krokodilo. Tiuj moneroj (1 € = iom pli ol 4 Steloj) estas uzataj dum la renkontiĝoj de la junulara esperantistaro. Oni povas ilin mendi.

La senpaga kaj reforma revuo estas petebla ĉe Walter : « esperanto@chello.at »



Lors de la séance Zoom du mardi 6 avril, **Paul Quevy** (de Reims) nous a fait un exposé épatant sur la fabrication du champagne. Pas moins de 26 personnes ont bu du petit lait (l'expression est-elle appropriée en la circonstance ?) en l'écoutant et en regardant ses diapos et ses courts reportages. Les étrangers présents résidaient en Allemagne, Italie, Suisse, Lituanie et Luxembourg. Ils ont posé de nombreuses questions. Paul Quevy, mérite bien qu'on boive une coupe à sa santé, d'autant qu'il ne pratique l'espéranto que... depuis deux années ! Les différents cours écrits et oraux par internet qu'il a suivis lui ont fait faire des pas de géant dans l'apprentissage de l'espéranto. ! Je via sano, Paul !



Stranga transportilo : la jœleto

Dum nia lasta somera tuttaga ekskurso en la valo Haute-Maurienne, proksime de montopasejo Iseran, Gigi kaj mi observis ne ordinaran karavanon.



Malsuprenirante posttagmeze, ni paŭzis por ripozigi niajn genuojn kiam, malproksime sur la serpentumanta pado sube, mi rimarkis malgrandan karavanon. De la loko flanke de la pado kie ni sidis, mi kalkulis ĉirkaŭ dek personojn kaj ... unu azenon.

Tiu karavano ne regule supreniris. Eta grupo antaŭeniris, haltiĝis, reantaŭeniris antaŭ alia pli longa halto. Alia eta grupo malantaŭ la unua same faris.

Post longa momento kaj alia paŭzo, sidantaj sur la herbo, vidante alveni la unuan grupon, ni tuj komprenis kial la antaŭeniĝo de tiu karavano estis tiel malfacila. Temis pri homoj kiuj transportis handikapulojn sur stranga rulseĝo kiu havas nur unu radon.

Sur la foto videblas la seĝo super la rado kaj la brankardoj antaŭ kaj malantaŭ, kiuj permesas ruligi aŭ porti la rulseĝon se necese.

Ni admire observis la teknikon de ĉiu skipo portante sian pasaĝeron. Antaŭ la obstaklo, alta ŝtupo, roko aŭ serio da rokoj, la gvidanto haltigas la skipon, klarigas la malfacilaĵon kaj kalkulas unu, du, tri ...hop !

Ĉiu scias kion li devas fari, laŭ sia pozicio, ĉu

tiri, ĉu levi, rekten, dekstren aŭ maldekstren laŭ la ordonoj de la gvidanto.

Dum la unua grupo haltis antaŭ ni, mi rimarkigis al la spirmankaj homoj ke, pli alte la pado iĝos multe pli malfacila kun grava kaoso da rokoj. « Jes, ni scias! Ni jam faris tiun ekskurson pasintjare! » respondis la gvidantino.

Nur tiam mi rimarkis, ke ĉiu portis dikan kaj verŝajne pezan dorsosakon! La lasta estaĵo de la karavano, kiu surdorse portis grandajn sakojn, ne estis azeno kiel mi unue pensis sed mulo aŭ mulino.

La mirinda rulseĝo nomiĝas « jœlette » ĉar la kreinto, montara akompananto, nomiĝas Joël Claudel. Li volis fari iun transportilon por ekskursi en la montato kun sia miopata nevo. Origine manfarita de la kreinto, la jœleto estas nun produktita de firmao en Saint-Étienne.

Ĝi akiris multajn plibonigojn: risortaron, bremsan kaj sistemon por adapti la altecon de la brankardoj laŭ la deklivo, seĝon adaptebla laŭ la handikapo. Ekzistas eĉ nun faldebla jœleto por pli facila transporto !

Handi Cap Evasion estas la nomo de la asocio kiu organizas vojaĝojn por handikapuloj, en Francio kaj eksterlande. Ĉiuj akompanantoj estas volontuloj.

(Pli da detaloj pri la « jœlette » : la jœlette-Handi Cap Evasion)




Gérard Sénécal (14)

KIO EN AVRANCHES ?

Malgraŭ la nuna situacio, Michèle Bodin sekvas perpoŝtan kurson korektatan de Yves. Dume, Jean-Pierre James elektis la retmetodon « i-kurso ». Lia referenca korektanto estas Rémi Troisgros el Carentan. Edith Payen de tempo al tempo vizitas la mardan rendevuon de la klubo de Hérouville per Zoom.

La normanda asocio restas je la dispoŝo de la aliaj kursanoj de Christian por helpi ilin en la praktiko de la lingvo. Ne hezitu kontakti nin aŭ Michèle, Jean-Pierre kaj Edith !

Pentraĵo el miaj vojaĝoj en damaĝitaj urboj kaj vilaĝoj



Dek jaroj pasis de la **Granda Orienta Japano Tertremo en 2011**. Kalkulante, kiom da fojoj mi vizitis la katastrofajn urbojn kaj vilaĝojn, 64 fojoj. De la gubernioj Aomori ĝis Ibaraki, mi ĉirkaŭiris multajn lokojn trafitaĵajn de la tertremo, la cunamo kaj la nuklea akcidento.

Estas tri kialoj, kial mi iris tiel ofte. Unu estas, ke kiel aŭtoro de « **Raportoj el Japanio** », raportoj en Esperanto pri Japanio, mi volis dissendi informojn pri tiu katastrofo al la mondo, precipe tiujn pri la nuklea akcidento, ĉar ĝi estas historia okazintaĵo, el kiu oni devas nepre lerni lecionon, do mi volis informi la mondon pri la nuna situacio en Fukuŝima kaj kontribui al la kontraŭnuklea movado.

Due, mi okupiĝis pri subtenado de **infanoj en Tooni** en la gubenrio luate de naŭ jaroj. Por la subtena movado, mi vizitis Tooni-on trifoje jare (diplomiĝa ceremonio, sporta festivalo, kultura festivalo), kaj profitante la okazojn, mi vizitis la ĉirkaŭan regionon. Trie, la nombro da interŝanĝoj kun lokaj homoj iom post iom pliiĝis, kaj miaj vojaĝoj ekcelis renkonti ilin.

Estas sennombraj pejzaĝoj en mia memoro pri tiuj urboj kaj vilaĝoj, kaj estas malfacile desegni

ilin sur unu paperfolio, sed mi kuraĝis provi.

La centro estas la pejzaĝo de Rikuzen-Takata fine de aŭgusto 2011. Dekstre staris 7-etaĝa « Kapitola Hotelo 1000 », kiu estis inundita ĝis la 4a etaĝo kaj poste malkonstruita. En la mezo, sur la nacia vojo n-ro 6, nur la ŝildo de la benzinstacio restis, kaj la ŝildo estis gratita. Ĝi signifas, ke ĝi estis inundita ĝis ĉi tiu alteco. La supera mezlernejo Takata videblas maldekstre. La areo estis la centro de la urbo, sed ĉiuj krom la betonaj konstruaĵoj estis forlavitaj.

La malsupre dekstre estas ĝuste apud la stacio Minami-Kesennuma, kie estis urbocentro, sed ĉio malaperis, kaj la kajo kaj la 4-etaĝa konstruaĵo enhavinta manĝejon kaj trinkejon restis. Apud tio estis amaso da dispremitaj aŭtoj. Ĉio estis ĉifita, kaj mi sentis min malĝoja, kiam mi pensis, ke iuj homoj certe mortis en ili.

La supre maldekstre kaj meze maldekstre estas Odaka en la urbo Minami-Sooma. Fukuŝima estis forte damaĝita de la tertremo, kaj ĉi tie en Odaka, plej multaj malnovaj lignaj konstruaĵoj disfalis aŭ la unua etaĝo disfalis. La vojo rekte al la stacidomo kurbiĝis.

Odaka fariĝis evakuada areo, ĉar ĝi troviĝas ene de 20 kilometroj de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukushima, kiu kaŭzis la akcidenton, kaj ne eblis eniri dum kelka tempo.

Ŝajnas, ke eblis provizore eniri en la urbon unu jaron post la tertremo, kaj la instruistoj en Odaka Elementa Lernejo aranĝis la havaĵojn lasitajn en siaj klasĉambroj. Mi iris tien ĉirkaŭ duonan jaron poste, do ŝajnas, ke iuj lernantoj revenis kaj alportis siajn havaĵojn, sed la havaĵoj de pluraj homoj en ĉiu klasĉambro restis. Post tio, mi vizitis ĝin ĉiujare ĝis la lernejo malfermiĝis, sed la ceteraj havaĵoj estis preskaŭ samaj, kaj fine ili estis stokitaj ie aŭ forĵetitaj, kiam la lernejo malfermiĝis. La vortoj de la instruisto restis sur la nigra tabulo, kaj ankaŭ la vortoj de la revenantaj infanoj. Mi ne povis legi la mesaĝojn sen larmoj.

Sube centre estas la tombejo de la distrikto Ukedo en la urbo Namie. La fiŝhaveno Ukedo estis tiel detruita, ke neniuj konstruaĵoj krom la elementa lernejo restis. En la tombejo, la tomboŝtonoj estis renversitaj kaj la urnoj estis malkovritaj. Ĝi estas senhoma pejzaĝo. Fore vi povas vidi la turojn de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukushima. Se ne okazus la nuklea akcidento, ĝi estus talusita same kiel la katastrofaj regionoj en lŭate kaj Mijagi, kaj eblus vidi iom da rekonstruo, sed ĉi tie preskaŭ nenio estis farita en la lastaj 10 jaroj. Eble ĉi tiu tombejo ankoraŭ nun estas tie, same detruite.

Supre dekstre estas portempaj loĝejoj en la urbo Aizu-Ŭakamacu, kien translokiĝis rifuĝintoj el la urbo Okuma, kie staras la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima. Ĉar multaj eksaj loĝantoj de Ookuma laboras en la nuklea centralo, duono de la loĝantaro estis en Aizu kaj duono en Iwaki proksima al la centralo. Pacifika marbordo de gubernio Fukuŝima estas varma loko, kie malofte neĝas, do kiel malfacile por ili vivi en tiel profunda neĝa Aizu kaj malbone ekipitaj portempaj loĝejoj. Eble jam malkonstruitaj estas tiuj loĝejoj, sed Okuma

ankoraŭ estas nlogebla areo, do ili ne povas reveni al sia hejmurbo. Eble ili daŭrigas sian vagantan vivon, konstruante aŭ luante novan domon ie.

Oni ofte diras, ke je la 10-jariĝo de io oni devas forgesi la pasintecon aŭ komenci ion novan ktp. kaj fakte la damaĝitaj urboj estas bele rekonstruitaj, do de ekstere ordinaraĵ vojaĝantoj ne povas imagi, ke tie estis tiel granda katastrofo, tamen ne eblas forviŝi la traŭmaton kaj malĝojon el tiuj, kiuj perdis siajn familiojn kaj hejmojn. Viktimoj de Fukuŝima eĉ ne povas reveni al siaj hejmurboj.

La ŝtato, eĉ en la gubernio Fukuŝima, antaŭenpuŝas politikon forĵeti la suferantojn, kvazaŭ ĉio "jam finiĝus". Pri mia vojaĝo, la "vojaĝo por vidi la eksteron" preskaŭ finiĝis. Ekde nun, kiel ni paŝos kun la homoj trafitaj de la katastrofo, kaj ĉu ni povos fari tion? Ĉi-jare mi havas 80 jarojn, kaj mi devas pensi pri mi mem ol pensi pri aliaj homoj. Tamen mi firme decidis, ke mi daŭre subtenos la eksajn loĝantojn de Fukuŝima, nun loĝantaj en mia gubernio Gunma, kiuj batalas kontraŭ TEPCO kaj la ŝtato, kaj la grupon batalanta por infanoj elmetiĝintaj al radioaktivaĵo el la centralo.

la 12an de marto 2021. HORI Jasuo

Hori Jasuo est très connu pour ses nombreux articles sur la vie au Japon en général et plus particulièrement sur ses reportages très documentés sur la catastrophe de Fukushima. Il est venu à plusieurs reprises à Hérouville dans le cadre de tournées de conférences et a contribué à l'accueil d'espérantistes hérouvillais au Japon.



HORI Jasuo prelegis pri la katastrofo en 2013



Aprilo 2011 prelegis **Keiko SANPEI** el Sandai

Sakuroj refloros ! La ret mesaĝo de **Ŝigeko** amikino el **Fukushima**.
10 jaroj poste La 12an de marto 2021



Vi sendis leteron al mi la 11an de marton, ĉu ne ? La sekvan tagon, la 12an je 23h45, granda tertremo je grado 6a atakis Tohoku, loko viktimo de granda tertremo antaŭ dek jaroj. Ĉi-foje mi vekigis pro terura tremo kaj rigardis ĉirkaŭen kaj tuj komprenis, ke elektro ne funkcianta en nia kvartalo, mi atendas sur la lito ĝis mateno.

Mia domo ne estis damaĝita sed en nia klubejo falis la bretoj por libroj kaj manĝiloj.

En mia ĝardeno ekfloras narcisoj, baldaŭ Sakuro (ĉerizarbo) ekfloros. Ĉiuj atendas rigardi Sakuran floradon

Nous programmons une JOURNEE TOURISTIQUE LE SAMEDI 2 OCTOBRE à EVREUX et sa région, à l'invitation de Barthélémy Maurau. Ce rendez-vous maintenant traditionnel remporte toujours un franc succès. Réservez dès maintenant cette date dans votre agenda ! Le bulletin d'inscription et le programme vous parviendront en septembre.

Les adhésions 2021 à notre association (au 10 avril) : ATTENTION ! EFFECTIFS EN FORTE BAISSSE !

Si votre nom n'est pas dans la liste ci-dessous, merci d'envoyer votre règlement à Sylvie Caron (Ou de nous signaler si nous avons omis de mettre votre nom. Voir en première page).

Seine-Maritime : Janine Badmington, Sylvie Caron, Josiane Defrance, Patrice Dufeu, Bernard Dufresne, Ginette Gueroult, Robert Guilmot, Pierre et Maryse Lemarchand, Dominique Leroy **Manche** : Annick Besneville, Véronique Bessin, Philippe Bony, Jean-Pierre Danvy, Patrick Etienne, Françoise Glémot, Lucienne Herpin, Jean-Pierre James, Auguste Lecarrie, Marcel Lemeltier, Elisabeth Mérel, Pierre Robiollé, RémiTroisgros **Orne** : Miša Chaplain **Calvados** : Véronique Charles, Dominique Cornice, Brigitte Cottin, Corine Dion, André Dubois, Claude Ferrand, Francine et Jean-Marie Fortin, Véronique Girard, Mado Hubert, Michèle Langeois, Christian Marlier, Yves Nicolas, Henri Rousseau, Simon Roussigné, Jean-Pierre Sauvage, Gigi kaj Gérard Sénécal, Bertrand Verstraete **Eure** : Rémi Lebrun, Barthélémy Maurau, Yolande Paris, Philippe Xilliox (27). **Autres** : Olga Beliaeva (Rusio), Denise Loisel (83), Marie-Thérèse et Pierre Quillaud (34), Jeanine Rousseau (60), Marie Thierry (75)

Enhavo

- P.1 et 2** : Mia unua esperantista rakonto
- P.2** : Normanda malnovtempo anekdoto
- P.3** : Afero Jules Durand en Le Havre
- P.4** : Une visite au Havre en Espéranto
où l'espéranto se fait voir et entendre
- P.5 et 6** : Entretien avec Gérard Lecarpentier
- P.7** : L'espéranto se montre à la télévision

- P.7 et 8** : La virtualaj kunvenoj de Hérouville-Espéranto
- P.9** : Stranga transportilo : la ĵoeleto
- P.10,11 et 12** : 2011-2021 : 10 jaroj poste
en Japanio, raportas Hori Jasuo
- P.12** : Journée touristique le 2 octobre
Liste des adhérents au 10 avril
Sommaire